

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sokr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX sur MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 92 27700 - LES ANDELYS

c.c.p. Association Cath. Franç. pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2 F; abono: 7 F; kotizo: 1 F; sume: 8 F. ====

XX

La materialon por la bulteno sendu al S-ino VINCENT antaù la 10-a de
marto, junio, septembro kaj decembro.

XX

---- N° 108 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
===== Sankta PIO X-a, preĝu por ni. =====

---- APRIL 1976 ----
=====

+++++

*** BILETO DE LA PREZIDANTO ***

Ce n' est pas à notre époque que l' on contestera l' importance de la communication comme élément d' efficacité et moyen de développement d' un mouvement comme le nôtre.

Dans l' histoire de l' Esperanto, les congrès ont toujours été les temps forts où se définit l' action et où se réchauffent l' ardeur et la générosité des militants.

Les associations comme la nôtre ont, elles aussi, besoin de ces rencontres qui sont l' expression d' une vie et la manifestation d' un idéal commun.

Nous vous invitons avec insistance à venir nombreux à Bourges, afin de participer à cette importante réunion qui nous donnera la rare occasion de nous retrouver ou de nous connaître et de définir nos buts et nos actions dans différentes régions.

Outre ces réunions, notre bulletin trimestriel s' efforce d' être un lien et son rôle est essentiel; cependant, nous souhaitons y trouver davantage l' écho des actions locales qui font progresser notre mouvement. Le bulletin doit apporter aux autres ce que vous souhaitez faire connaître et vous devez par sa lecture vous sentir solidaires dans l' action.

Sur le plan international, l' organe de communication de I.K.U.E. est "Espero Katolika", une revue qui est née au début de ce siècle, qui a continué malgré les crises, les éclipses et qui, franchissant de multiples obstacles, est demeurée vivante.

Nous croyons utile de demander, une fois encore, à tous nos membres de soutenir et lire cette revue et à ceux qui en ont le désir et les moyens de lui apporter un concours effectif.

A la faveur du congrès de Rome, le bulletin de U.E.C.I. (Unione degli Esperantisti Cattolici Italiani) a recueilli de nombreux abonnements étrangers et ceci peut-être aux dépens de notre organe officiel. Il s' est présenté comme une revue bien rédigée, dense et présente un certain intérêt que nous apprécions.

.../...

LA KUNULOJ DE SANKTA FRANCISKO.

En julio 1977 okazos internacia marŝo-pilgrimado de la Kunuloj de Sankta Francisko al ASIZO. La organizanto de la marŝo, S-ro Louis ACHILLE plezure akceptas la formadon de grupeto parolanta Esperanton. La gesamideanoj havas tie providencan oportunacon vivi kaj komuniki sian kristanan esperantistan idealon. Por kompreni tion, ni vidu, kiuj estas la kunuloj de S. Francisko.

1) DEVENO

En 1927, grupo de junuloj el diversaj medioj, unuigitaj laŭ la internacia paca idealo de la "Katolika Sulko" kaj laŭ la iniciato de Joseph FOLLIET kaj René BEAUGEY fondis la movadon, nomis ĝin "Kunuloj de S-ta Francisko" kaj organizis al Ste-Odile sian unuan pilgrimadon. En 1929 alvenis la "Kunulinoj" kaj en 1946 la "Hejmuloj". 1964 signis la unuan ekumenan pilgrimadon de la movado.

2) AKTIVADOJ

La ĉefaj aktivadoj de la kunuloj estas la pilgrimadoj pli malpli vastaj: regionaj, naciaj kaj ĉefe internaciaj. Tute ne temas pri ordinara senmova halto en iu sanktejo post tutkomforta vojaĝo per trajno aŭ aŭtobuso. Male, inter la vojaĝo per trajno kaj la halto, ni piede iras kaj tio estas la ĉefa parto de niaj pilgrimoj. La fizika marŝo kaŭzas rompon de niaj vivkutimoj kaj helpas la komunion kun niaj gefratoj kaj kun la naturo kreita de Dio. Samtempe tio estas fizika kaj spirita marŝo. Ĝi spirite alproksimigas nin, paŝo post paŝo, al la Kreinto kaj al la kreitaĵaro. Ĝi naskas kaj instigas niajn pensadojn, niajn meditadojn kaj fine niajn preĝojn.

3) EKZEMPLOJ

La multaj ekzemploj de la kunuloj estas ĉiuj marŝantoj al la Stelo! Abrahamo, kiu, sekvanta la dian vokon, forlasis sian naskiĝlandon Kaldeon, trapasas la teruran dezerton ĝis Kanaano. Moseo, kiu rekondukis tien la Hebreojn de la lando de mallibereco kaj sklaveco, Egiptujo. Francisko de Asizo, marŝanta tra la kamparo de Ombrio, kuntrenante siajn kunulojn al Kristo.

Same kiel tiuj entuziasmaj pilgrimantoj, la kunuloj antaŭeniras travivante la fratecon sen diferenco pri sociaj, rasaj, eĉ religiaj klasoj. Ili praktikas la spiriton de malriĉeco, akceptas la vivsimplecon je loĝado, manĝado, komunaj laboroj k.t.p.

Louis BOURDON (daŭrigota)

NOVA FRANCLANDO EN KANADO.

Pasintjare, en Sudokcidenta Francujo, oni festis la instaladon de franca loĝantaro en Kanado, kaj en Brouage (Charente-Mme) oni inaŭguris monumenton al Champlain, fondinto de la urbo Québec.

La elmigrado al Kanado komenciĝis en la jaro 1685-a. Kiam Pastoro Hamelin alvenis en Royan por disvastigi la reformitan religion, multaj tieaj loĝantoj konvertiĝis. Post kiam la reĝo nuligis la Nantes-anĉdikton, malriĉaj protestantoj organizis sian kaŝecon kaj kutimis partopreni diservojn sur barkoj okcidente de Royan. Tiuj neoficialaj diservoj estas la "Predikoj en dezerto."

Bonhavaj kredantoj elmigris Kanadon por ĝui pensliberecon. Ne nur protestantoj forlasis Francujon; ankaŭ katolikaj misiistoj velis Kanadon. Tie ili fondis lernejojn en ĉefaj urboj kaj universitatojn en Montréal. Nuntempe la Montrealan Universitaton estras la Patroj de la Sankta Spirito.

La elmigrintoj formis grandan familion, kiu nomiĝis "la nova Franclando." Dank' al ilia agado disvastiĝis kristanismo, kaj nuntempe multaj Kanadanoj estas konvinkitaj katolikoj.

Jean-Marie GUILLON

=====

GRAVA INFORMO!!!

La ĉefepiskopo de Bourges, M-ro Veynamour, tre afable konsentas esti la honora protektanto de nia katolika kongreso, kiun li eble vizitos en la Pentekosta dimanĉo.

AMASE VENU!!!

* * *

LINGVA ANGULO

I. Rimarko de S-ro Bourgois pri la traduko de "bouché à l' émeri" (v. FKE n° 106) "mensŝtopita" tre taŭgas. Tamen, mi dubas ĉu la ĝin antaŭanta adverbo "smirge" estus komprenebla de eksterlandanoj. Angloj, ekz. esprimas tion per "he is utterly stupid" (li estas tute stulta). Tial, mi opinias pli bone traduki per "li estas tute mensŝtopita".
NDLR. la alilandanoj faru kiel mi: ili serĉu "smirge" en PIV kaj ĝin trovos!

II. Demando de S-ro Dauchez: "Franco ofte hezitas uzi verbojn, kiuj en Esperanto havas alian signifon ol en franca lingvo. Ekz: ŝanceli, prosperi, domaĝi. Ĉu profesoro en Esperanto povus klarigi la ĝustan signifon per multaj ekzemploj?"

Al tio oni devas respondi unue, ke "profesoro" en Esperanto estas universitata titolo, kaj ke vere malmultaj estas tiaj en niaj vicoj, almenaŭ en Francujo. Due, kvankam ne profesoro, mi diru, ke la ĝustan signifon de tiuj verboj, kaj de aliaj, estas ne malfacile trovi: se ne en la multekosta sed necesega "Plena Ilustrita Vortaro", jen multe pli facile en la "Grand Dictionnaire Français" de Prof. Waringhien. Mi jam instigis, en "Falsaj Amikoj en E", ke estas la devo de ĉiu konscia esperantisto studi ne nur la gramatikon, sed ankaŭ la vortaron. Tiu konsilo estas ĉiam valida. En tiu sama verketo mi admonis al atentigo pri la transitiveco aŭ netransitiveco de la verboj, kiuj ne ĉiam kongruas kun la francaj. Mi ja scias, ke eĉ en la "nuna" franca oni tro ofte ne plu atentigas tion. Sola ekzemplo la multfoje aŭdata "il a débuté son article.." anstataŭ "son article a débuté..". "Débuter" estas netransitiva; la sola uzo transitiva estas "débuter une boule" (en keglo-ludo) (cf. Littré). Oni sekve pardonos al debutantaj esperantistoj koncerne tiun pekon, se jam la "talentaj" homoj de nia radio kaj televido tiel fuŝas (ĉar tio estas nur unu ekzemplo!) nian belan francan lingvon. Mi tamen diru, ke "ŝanceli" estas transitiva, sekve "li ŝancelis sian opinion", "mi ŝanceliĝis en mia decido" (mi hezitis); "prosperi" estas netransitiva, sekve "prosperis al mi tiri lin al mia hejmo", "li prosperiĝis sian komercon dank' al senlaca laboro"; "domaĝi" signifas "épargner (sapeine), ménager (son porte-monnaie), ktp" kaj tute ne "endommager", sekve (el PIV) "nedomaĝi sian peŝon", "pafu, kaj ne domaĝu sagojn", ktp.

Multaj povas esti la pekoj kontraŭ la lingvo. Por perfektigi: post serioza studado de la gramatiko, intensaj traserĉoj en la vortaro, kaj legado (ofta, tre ofta) de bonaj aŭtoroj.

Roger BERNARD.

III. Al la proponoj de n° 107 venis respondoj de: S-roj Bourgois (B), Dauchez (D), De Salvo (DS), Guillon (G), S-ino Michau (M) kaj 5 Nantes-anoj (5).

1) kvereleto (B); disputo (D); havi disputon (DS); sperti grandegan malfacilaĵon (G); etkaŭze kvereli (M); ekkonflikti kun, havi oston dividotan (5).

2) plenscie (B, 5); saĝe, bonscie (D); pripense (DS); tute prave (G); trafe elpensite (M).

3) jen la vunda loko (B); tie kuŝas la ĝenaĵo, la dorno (D); jen la tikla punkto (DS); jen tio, kio ĝenas (G); jen la preciza dolorpunkto (M); (oni konas) la sentivan punkton (5).

4) samvojiri, kuhvojaĝi (B); duope vojaĝi, kune aĝi (D); iri sampaŝe (DS); helpeme kuniri (M); veturi kune, kompanie (5).

5) li atente legas sian (kutiman) gazeton (B; G); li legas, kvazaŭ droninta en sia gazeto (D); absorbite li legas sian gazetaĉon (M); li legas dronanta en la gazetaĉo (5).

6) nesupereble (B); neniu peco restas enmetebla (D); konklude (DS); la laboro estas plene finita (G); la kulmino estas atingita (M); konstruado finita, la ŝtupetaro estas formetenda, tion oni povas klasi sur la bretaro (5).

7) kunagi (B); kunmarŝi kun konsento (D); iri agorde (DS); plenkonsente aĝadi (G); harmonie akordiĝi, kunsenti (M); akordiĝi, koncerte (5).

8) la registaro ne volas helpi la lamajn entreprenojn (B); .. senkapablulojn (D); la ŝtato ne volas helpi malstabilajn aferojn (M); .. provizi vivtenon por lamaj birdoj (5).

.../...

ERRATUM: malsupre de la p. 4, bonvolu legi "M-ro Vignancour".

KONSILIA KUNVENO (7/3/76)

Ĉeestas: S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Vanneau, S-to Bourdon, F-to Marmou, S-roj Colas kaj Despiney.

S-ro Villeneuve sidas kiel observanto.

Petis senkulpigon: S-to Degrelle, S-roj Bessière kaj Ligot.

La kunveno malfermiĝas je la 14.30 per komuna preĝo.

1. S-ro Colas sciigas nin pri la elekto de nova prezidanto de IKUE: la franciskano Ceslao BIEDULSKI. Nia prezidanto sendos al li gratulleteron.

2. KONGRESO EN BOURGES. Nia ĝenerala sekretario legas la afablan leteron de la ĉefepiskopo, kiu konsentas doni sian honorprotektadon. La religiulinoj, kiuj akceptos la kongresanojn, anoncas kelkajn ŝanĝojn en la restadprezoj.

3. KONSILIO. S-ro Ligot, membro de la renovigota triono, ne rekandidatiĝas. Ni esperas trovi anstataŭanton. Por anstataŭi S-ron Barrier konsentas S-ro Villeneuve.

4. DISERVO EN LA GRANDE-MOTTE. S-to Bourdon provos aranĝi la aferon kun S-to Casanoves.

5. NIA BULTENO. Malĝoje ni eksciis, ke nia kunlaboranto S-to Ouarnier, pro parta perdo de sia vidpovo ne plu povos provizi la ilustritajn paĝojn. Providence S-roj Delcourt kaj Amoureux faris proponon laŭsence. La konsilio decidis provi.

6. ESPERO KATOLIKA. Nia prezidanto daŭriĝas sian agadon, por ke tiu revuo vere spegulu la internacian katolikan Esperanto-vivon. Lia ĉefa argumento estas jena: nacia bulteno por landa katolika Esperanto-asocio, internacia bulteno por internacia katolika Esperanto-asocio.

7. Laŭ la peto de S-to Degrelle estas decidite, ke S-ro Despiney sendos al li fotokopion de esperanto-tekstoj pri nupta ceremonio.

8. Nia ĝenerala sekretario prezentas atingiĝojn en diversaj partoj de informado: Gazetaro: pluraj artikoloj. Televido: elsendo pri Esperanto prezentota de UFE la 26-an de marto (FR3 Tribune libre 19.40). Ekspozicio: en "EXPO-JEUNES" la junaj geesperantistoj, kiuj deĵoris en sia budo, havas fruktodonajn kontaktojn. Glumarkoj: pro la rapida elĉerpiĝo de la mil unuaj folioj 9-vinjetaj, oni devas atendi la presadon de tri mil pliaj folioj.

9. MONKOMPENSO AL UFE. La konsilio decidis pagi po 100 F jare al UFE kiel partoprenon en ĝiaj elspezoj.

10. NOVA INFORMILO. S-ino Vincent jam skizis projekton, sed ŝatus havi proponojn de aliaj anoj. La limdato de la konkursoj restas senŝanĝa.

La kunveno finiĝas je la 17.00 per komuna preĝo.

Protokolis: Roger DESPINEY.

6666

JARKUNVENO DE FKEA EN BOURGES 6-an de Junio 1976.

Instrukcioj por la balotado: estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Bonvolu enmeti la ĉi suban voĉdonilon en koverton kun indiko "Voĉdonado FKEA". Tiun fermitan koverton enŝovu en alian, afrankitan je 0,80 F, kiun vi sendos al S-ro R. Despiney 43, quai de Champagne 94170-LE PERREUS/Marne; indiku dorsflanke vian nomon kaj adreson. Se vi ne partoprenos la kongreson, sendu krome la ĉi suban rajtigilon, en la sama sendaĵo.

RAJTIGILO: mi subskribinte (nomo, voknomo)

ne povante partopreni la kongreson, transdonas mian povon al por ĉiuj decidoj favoraj al la asocio.

Antaŭ ol subskribi, skribu

Dato kaj subskribo:

"Bon pour pouvoir"

